

Johann Wolfgang von Goethe,
Gefunden

Johann Wolfgang von Goethe,
Trovita

Johann Wolfgang von Goethe,
Trovaĵo

tradukita de Antoni Grabowski

tradukita de Richard Schulz

Ich ging im Walde
So für mich hin,
Und nichts zu suchen,
Das war mein Sinn.

Mi foje arbaron
Promene eniris,
Kaj serĉi nenion
En penso deziris.

Mi vagis sola
En la arbar'.
Nenion serĉi
Jen mia far'.

Im Schatten sah ich
Ein Blümchen stehn,
Wie Sterne leuchtend,
Wie Äuglein schön.

Mi vidis, en ombro
Jen staras floreto:
Steleto lumanta
Aŭ blu-okuleto.

Enombre vidis
Floreton mi.
Lumanta stelo,
Okulvizi'.

Ich wollt' es brechen,
Da sagt' es fein:
„Soll ich zum Welken
Gebrochen sein?“

Mi volis ĝin ŝiri,
Sed plore ĝi diras:
“Ĉu por ke mi velku,
Vi tial min ŝiras?”

Al mi plukonta
Jen ĝia vort':
„Ĉu ke mi velku
Al frua mort' ?“

Ich grub's mit allen
Den Würzlein aus,
Zum Garten trug ich's,
Am hübschen Haus.

Do mi ĝin elfosis
Kun radikareto,
Kaj portis al mia
Ĝarden' ĉe l' dometo.

Mi ĝin elfosis
Kun la radik'
Ĝin portis domen
Al la larik'.

Und pflanzt' es wieder
Am stillen Ort;
Nun zweigt es immer
Und blüht so fort.

En loko trankvila
Plantite karese,
Ĝi kreskas, burĝonas,
Kaj floras senĉese.

Replantis tie
Ĝin en la fru'.
Ĝi nun kreskadas
Kaj floras plu.

...

...

...

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22).

Arg-376-738 (2006-12-11 22:11:49)

Traduko de la Germana poemo "Gefunden" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) *en Esperanton de* ANTONI GRABOWSKI (*1857-06-11 - †1921-07-04).

Arg-376-741 (2006-12-14 00:07:48)

Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi traduk-version en la interreto, en la retejo de s-ano Don Harlow, en <http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/Poezio/parnaso/>, precize sub <http://donh.best.vwh.net/Esperanto/iteraturo/Poezio/parnaso/trovita.html>.

Traduko de la Germana poemo "Gefunden" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) *en Esperanton de* RICHARD SCHULZ (*Rikardo Ŝulco*, *1906-07-12 - †1997-09-26) *en* 1984-07.

Arg-376-740 (2013-02-26 15:17:50)

Tiu ĉi poem-esperantigo aperis en la n-ro 61 (1984/7) de la Vestfaliaj Flugfolioj“, kiujn eldonis Richard Schulz, kiu loĝis tiutempo en la germana urbo Mindeno (Minden). Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz.